



Saluton al vi ĉiuj.

Jen grava dokumento por esperantoparolantoj, esperantistoj kaj partianoj aŭ partizanoj de la esperantismo. Ankaŭ por rivaloj, malamikoj, rifuzantoj, kritikantoj aŭ reformemuloj de la lingvo Esperanto!

Kutime, la analizoj de Esperanto kiel lingvo estas indulgemaj pri la difektoj de Esperanto, se ne bigotaj, apologiaj aŭ eĉ fanatikaj pro la perfekteco de ĉiuj trajtoj el Esperanto. Male, la dokumento kiu aperas tuj estas almenaŭ ne flatanta nek indulgema pri la lingvo Esperanto, ĉar ĝi estas farita de verkanto kiu malŝatas Esperanton, kvankam ĝin li (ek)parolas kaj li Esperanton ne volas uzi. Li eksplicite rekomendas ke oni ne parolu Esperanton, kun detalema instruado pri la difektoj de Esperanto kiuj, laŭ li, konsilas ne lerni nek uzi ĉi tiun helpoplanlingvon.

La originala dokumento ne estas verkita per Esperanto, sed per angla. Do, kvankam ĉi tiu argumentado kontraŭ Esperanto estas sufiĉe fama ĉe la esperantomovado, oni tradicie riskis paroli pri ĝi kiel pri aliaj famaj verkoj (la Biblio, la Kapitalo de Karlo Markso, kaj tiel plu), verkoj kiujn ofte oni laŭdas aŭ mallaŭdas... ilin entute ne leginte!

Nu, mi opinias ke, per mia traduko en Esperanton de ĉi tiu atako kontraŭ nia komuna lingvo, ni povos juĝi pri ĉu la pravo ĉu la malpravo de la argumentoj el ties verkanto.

Mi bonvenas ĉiujn kritikojn kaj sugestojn por plibonigi mian tradukon. Mi nur antaŭnuancas ke iuj evidentaj eraroj (evidentaj miaopinie!) ĉe mia traduko jam aperas en la originalo, ĉar tiujn erarojn de la originalo mi kopiis en la tradukon, nur korektante la duarangajn, meĥanikajn kaj ortografiajn erarojn. Male, la eraroj de argumentado reaperas ĉiuj en mia traduko, inter aliaj kialoj ĉar io ŝajnas erara al mi povas ŝajni pravega al alia leganto.

Kutime mi aldonas iksosurogatan kopion de miaj mesaĝoj; sed, ĉar pluraj interretaj forumoj fiksas limon de longeco al la sendotaj mesaĝoj, ĉifoje mi preferas sendi nur la supersignan version. Se iu leganto ricevas fuŝan aŭ kriplan mesaĝon, mi povas resendi al li aŭ al ŝi iksosurogatan version private.

Amike, el Aleksandro Ksavero Kasanovo Domingo, elektronika poŝto trigrupo@yahoo.es (trigrupo atelo yahoo punkto es).

Ci lernu la kialojn pro ne paroli Esperanton.

Justin B Rye (Justin Byam Rye)

*1993-2010 (La lastaj ŝanĝoj estas markitaj per signo de asterisko: *).*

Elektronika poŝto de la originala aŭtoro:

justin.byam.rye@gmail.com. La nomo "Justin Byam Rye", prononce "Ĵustin Bajam Raj", havas plimalpli la esperantan formon "Ĵustino Bajamo Rajo".

Elektronika poŝto de la tradukanto: trigrupo@yahoo.es.

Nomo de la tradukanto el la angla lingvo en Esperanton:
Aleksandro Ksavero Kasanovo Domingo.

La originalo, skribita per angla lingvo, estas elŝutebla el pluraj interretaj lokoj, ekzemple el ĉi tiu loko:

<http://www.xibalba.demon.co.uk/jbr/ranto/#a>

Sed la originalon per angla lingvo ankaŭ oni rajtas peti al tradukanto en Esperanton, sen bezono de interreta ŝaltado.

La traduko ne estas laŭlitera nek intencas reprodukti la originalan stilon, sed simple ĝi intencas prezenti per Esperanto la originalan argumentadon kiel eble plej klare, inkluzive ties eblaj eraroj. Nur aperas tradukita la korpa teksto, sen siaj aldonaĵoj, jen rektaj, jen aluditaj (aldonaĵoj kiujn oni povas konsulti anglalingve en la ĵus citita interretejo). Do, la tradukita teksto restas memstara, kiel baza konsultejo por la ideoj de ĝia originala verkanto.

SEKCIO A: SUPERRIGARDO

A1: Enhavo

SEKCIOJ:

A: SUPERRIGARDO*

B: FONEMOJ

C: ORTOGRAFIO

D: FONOTAKSIO* (PRONONCOSTILO)

E: DERIVADO*

F: LEKSIKONO

G: KONSTITUADO* (PARTOJ DE LA FRAZO)

H: VERBOJ

I: SUBSTANTIVOJ

J: PRONOMOJ

K: ADJEKTIVOJ

L: ADVERBO

M: SINTAKSO

A2: Fono

Esperanto estis inventita en 1887 de oftalmologo de Bjalistoko, Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhofo (pseŭdonime "Doktoro Esperanto", tial la nomo).

Eĉ ĝiaj propagandantoj taksas ke ekzistas apenaŭ unu miliono da esperantoparolantoj en la mondo (plejparte ĉe Centra/Orienta Eŭropo); oni komparu per la albana lingvo kun pli ol ses milionoj, la mandarena ĉina lingvo kun 1000 milionoj, kaj la angla kun (laŭkalkule) 500 al 1500 milionoj. Eĉ Klingono (amuzofikcia lingvo) ŝajnas preterpasi Esperanton tie ĉi en la lingvomerkato.

La plimulto da personoj kiujn mi konas malakceptas Esperanton, sed plejparte pro stultaj kialoj - "Ĉiu parolas la anglan hodiaŭ ĉiuokaze.", "Ĝi ŝajnas iomete fremda.", "Ĝi ne havas propran kulturan identecon.", kaj tiel plu. Mi, aliflanke, havas antipation al Esperanto ĉar ĝi estas:

- Sufiĉe bona por inspiri kontraŭreviziisman fanatikecon!
- Sufiĉe malbona por okulfrapi la ĝeneralan publikon kiel ridinda!
- Sufiĉe facile plibonigebla por inspiri konstantajn fuŝajn "reformojn" kies inventintoj argumentas rivale inter si!

Tial la rezulto de la zamenhafa peno estas ĉi tio: ke estas neimagebla la sukceso de iu ajn artefarita "interlingvo", eĉ bona.

A3: Kriterioj de klasifikado

Ia optimume dizajnitaj monda helpoplanlingvo devus esti

1. Klara - tio estas, ĉiuj ĝiaj reguloj devus esti eksplicite establitaj, por ke ties uzantoj povu elfiltru malgramatike formatajn esprimojn.

2. Simpla - implicante kiom eble plej malgrandan kvanton da gramatika komplekseco (ekzemple, neregulaj formoj, kapricaj fleksioj aŭ arbitraj kategorioj kiel "femina gramatika genro").

3. Internacia - tiom lernebla por Tamuloj, Koreoj aŭ Zuluoj kiom por Eŭropanoj, kiuj ĉi lastaj jam havas multajn avantaĝojn.

4. Eleganta - dizajnitaj por impresi la potencialajn parolantojn kiel nepeniga kaj nature uzebla.

Mia objekto estas ke, male, Esperanto estas

1. Obskura - plena da kaŝite akceptitaj reguloj kaj neavertitaj uzadoj.

2. Komplikata - kun kazoj, adjektiva konkordo, verbaj subjunktivoj kaj tiel plu.

3. Koteria - dizajnitaj por alvoki ĉefe Eŭropanojn.

4. Fuŝa - plena da malfacilaj sonoj, strangaj literoj kaj absurdaj vortoj.

Ĝi ŝajnas kvazaŭ ia ĉeĥa/itala piĝino streĉoludila. Kaj se ekzistas unu parto de ĉi tiu mondo kiu ne bezonas lokan piĝinon, jen Eŭropo, kiu ne nur havas (konjekteble) la plej altan koncentriĝon de profesiaj poliglotoj en la mondo, sed estas ankaŭ la hejmo de la aktuale efektiva tutmonda komuna lingvo: la angla.

Se Esperanto malaperus de ekzisto, nenio de valoro estus perdita; la mondo elmontras nenian indikon de deziri la lernadon de internacia helpoplanlingvo. Eble iam tio ŝanĝos - sed se tio okazas, ni havos abundajn kandidatojn inter kiuj oni elektu, ĉar Esperanto havas multajn pli bone dizajnitajn sed malpli konatajn konkurecantojn. (Ili eble havas malpli da nunaj parolantoj, sed la diferenco estas eklipsita de la miliardoj da ili nepraj por sukcesi.) Aŭ la Unuiĝintaj Nacioj povus dungu unu lingviston aŭ du kaj akiri lingvon taŭga, la vojo kiun Holivudo (originale, "Hollywood", prononce "Holiŭud" kun akcento en la vokalo "o", fama usona filmoproduktejo) nun rutine uzas por fantaziaj filmoj!*

A4: Signaro

Ĉi tiu afero estas malfacile pritraktebla ĉe dosiero kun simpla kodado ASCII (tipa komputila kodado por literoj de ŝtateropaj lingvoj)! Kiel provizora solvo dum oni esperas ke Unikodo estu subtenita unuanime kiel ŝablona normo, mi reprezentos iujn supersignojn per simboloj post ilia letero: s[^] staras anstataŭ la cirkumflekso super la litero "s", s^ˇ anstataŭ la renversita ĉapelo kiun oni skribas ekzemple en la ĉeĥa lingvo super la litero "s", kaj tiel plu. Sekve, ekzemple, la parolaĉo de Esperanto (en akuzativa plurala kazo) por la angla parolo "surroundings" (prononco: suraŭndins) estas la malbelega formo "ĉirkaŭaĵojn", skribita per surogato "c[^]irkau^ˇaj[^]ojn".

Laŭ klasikaj lingvistikaj akordoj, oni uzas grafikajn entenilojn kiel [kvadrato], /kliniĝo/ kaj <angulo> por distingi [fonetikajn], /fonemajn/ kaj <ortografiajn> analizojn, kun fonetikaj simboloj similaj al tiuj el la normo "Kirshenbaum ASCII IPA", uzita interrete en la interretforumo de noticoj "sci.lang" (prononco de "Kirshenbaum": "Kirŝembaŭm, esperantigite "Kirŝembaŭmo"). La kurtigo "IPA" aludas la nomon en angla de la Internacia Fonetika Alfabeto.

Nelingvistoj povas legi ĉion kio estas neklara kiel "iom da stranga bruo".

A5: Malgarantio

Mia kriterio pro "klareco" frapas iujn legantojn kiel maljusta en ĝia ŝajna (antaŭ)supozo ke la putraj sininstruadaj tekstoj kiujn mi estas elmetitaj estas ĉiu gramatiko de Esperanto gramatiko kiu ekzistas... do oni nur prenu miajn retorikajn demandojn kiel provoj por sugesti ke ekzistas lingvodizajnaj demandoj pri kiuj Zamenhofo elmontris nenian indikon de agnosko, kaj kiujn liaj posteuloj preferas ne mencii*. Modernaj Esperantistoj agnoskas neniun Aŭtoritaton por Daŭrigado de la Normoj; sekve unuflanke rektaj fundamentaj reformoj estas neeblaj, kaj aliflanke la dialektoj neeviteble konfuzas la aferon. Kaj oni bonvolu memori ke mia kritika komentario celas la pretendemojn de Esperanto kiel tutmonda helpa lingvo; se ci estas hobisto poliglota kiu intencas lerni sian sepan eŭropan lingvon, mi invitas cin pro malŝpari cian libertempon kun ĝi.

SEKCIO B: FONEMOJ (inventaro de uzitaj sonoj)

B1: Enkonduko

La "fonemoj" estas la reciproke distingitaj sonelementoj kiujn difinita lingvo agnoskas kiel fundamentaj konstruelementoj por vortofarado. La angla - mia dialekto de la angla, ĉiuokaze - havas 19 vokalojn (plejparte diftongoj), kaj 24 konsonantojn (interalie la du afrikatoj /dʒ, tʃ/, kutime skribitaj kiel <J, CH>).

La angla lingvo - entute 43 fonemoj: jen analizo pli didakta ol preciza.

/ m b p v f w /
/ n d t D T r /
/ l dʒ tʃ Z S j /
/ N g k z s h /
/ i e @ a u o /
/ ii ei - ai - oi /
/ i@ e@ @@ a@ u@ o@ /
/ - - - au uu ou /

Esperanto - entute 34 fonemoj: kvankam la diftongoj estas diskutindaj! Laŭ la surogato proponita de Ĵustino Bajamo Rajo; pro plua klarigo, aperas paralele kaj parenteze ankaŭ la sistemo per veraj supersignoj:

/ m b p v f /	(m b p v f)
/ r d t j h /	(r d t j h)
/ w - ts z s /	(ŭ - c z s)
/ l dʒ tʃ Z S /	(l ĝ ĉ ĵ ŝ)
/ n g k - x /	(n g k - ĥ)
/ i e a o u /	(i e a o u)
/ - ei ai oi ui /	(- ej aj oj uj)
/ - eu au - - /	(- eŭ aŭ - -)

B2: Klareco

Naturaj lingvoj havas regulojn kiuj determinas kiuj sonoj estas akcepteblaj

kiel formoj de kiu fonemo. Ekzemple, en la angla /t/ povus esti elspirata alveolara plosivo, glota halto aŭ eĉ frapeto; en la hispana /t/ estas kutime nespirata denta plosivo, kaj la frapeto estas aŭdita kiel sono [R]. Esperantoparolantoj montras neniun interkonsenton eĉ pri la ekzisto de tielaj reguloj. (Kaj tiuj, kiuj skribis min aspektas elstare nevolemaj por interkonsenti pri ĉu intervortaj glotaj haltoj estas devigaj, laŭvolaj, aŭ malpermesitaj.)

B3: Simpleco

Unue, kial la inventaro estas tiel neregula? Mankas simpla fonemo /dz/, kial, do, /ts/ necesas? Kial /oi/ sed ne /ou/? Kaj due, kial ĝi bezonas tiel multe da konsonantoj? La tutmonda ordinara mezo estas havi plimalpli dudek kvar konsonantajn fonemojn, kaj multaj lingvoj pluvivas kun malpli da konsonantoj - ekzemple:

Andea hispana dialekto: / m p B f n t D s l * r n ^ t S j k Q h /

Japana: / m b p w n d t r z s j g k h /

Havaja: / m p w n l k h ? /

Rotokasa: / p B t * k g /

B4: Internaciismo

Oni komparu la esperantan inventaron kun la sekvonta:

Orienta pola dialekto - entute 49 fonemoj: (parentezaj fonemoj) estas trompevestitaj de la kutima pola ortografio.

/ m b p v f /

/(m; b; p; v; f;)/

/ r d t j h /

/ w (dz) ts z s /

/ l (dz; ts; z; s;)/

/ - dZ tS Z S /

/ n g k - x /

/(n; g; k; - -)/

/ i e a o u /

/ - ei ai oi ui /

/ - eu au - - /

/(- e~ - o~ -)/

La solaj fonemoj kiujn Zamenhofo eksterlasis de Esperanto estas tiuj, kiuj estas malfacile rekoneblaj ekde la originala sono - la "molaj" (palatalaj) konsonantoj, nazalaj vokaloj, kaj /dz/! Kaj oni notu, ke mi parolas pri orienta Polujo; jen ne nur lia natura slaveska antaŭjuĝo, jen eĉ la bjalistoka dialekto!

B5: Eleganteco

Plendoj pri la malbelaj sinsekvoj de afrikatoj kaj tiel plu estas ĉiam elpuŝitaj kiel laŭgusta afero. Sed enketoj diras ke distingoj kiel /v/ - /w/, /ts/ - /tS/, /z/ - /Z/, /h/ - /X/ estas statistike raraj, do pravas objekte la popolo kiu taksas tiujn esperantajn sonojn kiel strangaj kaj neoportunaj!

B6: Diversaĵoj

Ĉi tiu freneziĝinta inventario estas grandioza manifestacio de la lingva nekompetenteco de la doktoro Zamenhofo; li ne povis vidi preter la literumaj reguloj de la unua lingvo kiun li lernis skribi per la latina alfabeto!

SEKCIO C: ORTOGRAFIO (grafema sistemo)

C1: Enkonduko

"Grafemo" estas kontrastiva unuo en prononca sistemo skribita. Kompreneble, Esperanto literumo estas multe pli bona ol la angla (kie <gh> estas fame ĥaosa); ĝi povas eĉ esti mapita laŭ strikta individua korespondado kun ĝia fonemaro:

Ortodoksa ortografia supersigna sistemo. Laŭ la surogato proponita de Ĵustino Bajamo Rajo; pro plua klarigo, aperas paralele kaj parenteze ankaŭ la sistemo per veraj supersignoj:

< m b p v f >	(m b p v f)
< r d t j h >	(r d t j h)
< u [˘] - c z s >	(ŭ - c z s)
< l g [^] c [^] j [^] s [^] >	(l ĝ ĉ ĵ ŝ)
< n g k - h [^] >	(n g k - ĥ)

< i e a o u >	(i e a o u)
< - ej aj oj uj >	(- ej aj oj uj)
< - eu [˘] au [˘] - - >	(- eŭ aŭ - -)

Sed nekontentiĝinte pri tio, ke ĝi estas fonema (unu fonemo: unu grafemo), Esperanto ankaŭ asertas esti fonetika (unu sono: unu letero), kiu estas (a) sencela kaj (b) nerealigebla.

C2: Klareco

Ĉu Esperanto permesas iun variaĵon en siaj sonoj? Ĉu ni devas kredi ke la <n> en <s[^]nuro> ("ŝnuro") estas akustike kaj artikulacie identa al tiu en <fingro> ("fingro")? Se jes, Esperanto devas esti diable malfacila al prononcado. Aŭ, ĉu Esperanto <l>-oj varias subtile kiel la <l>-oj en <atletaj lernejoj>, kaj la <t>-oj kiel tiuj en <li estu strikta>? Kiuj reguloj regas, ekzemple, sinsekvojn da voĉaj kaj senvoĉaj sonoj, kiel la <kv> en <kvar> ("kvar") kaj la <kz> en <ekzisti> ("ekzisti")? Kaj, ĉu estas la vorto <nau[˘]a> ("naŭa") prononcita /naw-a/ aŭ /na-wa/?

C3: Simpleco

La sistemo estas groteske neregula. Kial estas duonvokala grafemo <u[˘]> sed ne <i[˘]>? (Indico: oni komparu la belarusan cirilan alfabeton!) Kial <s[^]> sed ne <z[^]>? Kial la afrikato <g[^]> formas paron, ne kun <k[^]> sed kun <c[^]>? Kial la palatovela frikativo <h[^]> alivestiĝas kiel formo de la glota proksimanto <h>? Kaj precipe, kial <c g s j h> portas kutiman cirkumflekson dum <u> havas renversitan cirkumflekson?

C4: Internaciismo

Skribi formojn kiel <c oj eu[˘] s[^]> prefere ol, oni diru, <ts oy ew x> estas senhonta montro de partecaj literumaj tradicioj. La plimulto da la skribmaŝinoj de la mondo havas klavon <w>; neniu havas literon <c> kun cirkumflekso. Neniu, eĉ ne en Kroatujo; fakte en kroata lingvo oni uzas hokojn kaj akutojn!

C5: Eleganteco

La problemoj pri ĉi tiuj diakritaĵoj estis evidente sufiĉa por forta cedo: ni rajtas uzi la digrafojn <ch gh sh jh hh (?!)>, plus senornaman <u> - tial <chirkauajhojn>. Multaj Esperantistoj rekomendas aliajn ASCII-grafikaĵojn kiel <cxirkauxajxojn>.

sed mi persistos kun la malplej ŝokanta versio.

C6: Diversaĵoj

Nur por montri kiom facila tio estas, ĉi tie estas alternativa sistemo sen diakritaĵoj (ĉiuj komponitaj fonemoj devenas komponitaj grafemoj). Laŭ la surogato proponita de Ĵustino Bajamo Rajo; pro plua klarigo, aperas paralele kaj parenteze ankaŭ la sistemo per veraj supersignoj; oni notu ke la supersigna litero "ĥ" kaj la sensupersigna litero "h" kunfluas en sensupersignan literon, laŭ lia surogato:

Malortodoksa ortografia sistemo:

< m b p v f >	(m b p v f)
< r d t y h >	(r d t y h)
< w dz ts z s >	(ŭ dz c z s)
< l dj tx j x >	(l ĝ ĉ ĵ ŝ)
< n g k - h >	(n g k - ĥ)
< i e a o u >	(i e a o u)
< iy ey ay oy uy >	(ij ej aj oj uj)
< iw ew aw ow uw >	(iŭ eŭ aŭ oŭ uŭ)

Sekve <c^irkauaj^ojn> fariĝas <txirkawajoyn>. Sed mi povus apenaŭ halti ĉi tie; la plej proksima duonvoja prudenta versio estas <kirkuajo>!

SEKCIO D: FONOTAKSIO (sinsekvoj da sonoj)

D1: Enkonduko

La fonotaksio estas la sistemo de reguloj kiuj regas kiun sinsekvoj da sonoj estas permesitaj. En la angla, ekzemple, /h@N, viZnz, streNTs/ okazas (<hung, visions, strengths> (pendi, vizioj, fortoj), sed /N@h, Znzvi, stle/ estas malpermesitaj.

D2: Klareco

La solaj sugestoj kiujn ni akiras pri Esperanto fonotaksio estas banalaj certigoj

pri tio, kiom belsona ĉio estas. Klare ekzistas restriktaj: Esperanto havas multajn vortojn kiel <shtrumpo, knabchjo, postscio> sed neniu kiel <snouz, uahda, gvbrdgvnit> (oni komparu respektive kun la prononcadoj de la angla "neĝoj", de la araba "unu" kaj de la kartvela "ci ŝiras nin en pecojn"). La ekstra /o/ sono en kunmetaĵoj kiel <dormo-chambro> estas "laŭvola", sed lasi tiajn aferojn al esperantistaj indiĝenalingvaj antaŭjuĝoj produktas alojajn kiel <antikv-scienco>, "arkeologio". Ne, mi ne ŝminkas ĉi tion...

D3: Simpleco

En ĉi tiu kunteksto, simpleco signifas lerneblajn regulojn por konstrui paroleblajn vortojn. Alta proporcio de la monda loĝantaro trovas iun silabon ajn pli kompleksa ol "konsonanto + vokalo" malfacile prononcebla, sed la komplikaj silaboj de Esperanto limigas malakcepteble la prononceblecon.

D4: Internaciismo

Zamenhofaj penoj por ŝajnigi Esperanton kiel la italan lingvon per la aldono de finaj vokaloj estas malgaje neadekvataj. La itala uzas fermatajn silabojn ŝpareme (ĉefe fine en /r, l, n/); Esperanto amas ilin. La itala permesas malmultajn sinsekvojn de konsonantoj (plejparte formoj kiel, ekzemple, /bl, gr, sp/ kaj duoblaj literoj); Esperanto permesas multajn. Kaj la rigida akcenta regulo en la antaŭlasta silabo povus esti kiel en la itala, sed estas eĉ pli kiel en la pola.

D5: Eleganteco

La tuta problemo estas tio, ke Zamenhofo misprenis siajn proprajn antaŭjuĝojn pri "belsoneco aŭ eŭfonio" kiel tutmonde akceptita ŝablono de fonotaksia eleganteco. Ne ekzistas tia ŝablono; la itala estas plena de lingvotornadoj por la japanaparolantoj (<postbellico>, prononce "postbelliko" kun akcento en la vokalo "e", "postmilita"), kaj inverse (<hyakugyoo>, prononce "hjakugjoo", "cent linioj"). Eĉ lingvoj funkciante silabe per konsonanto + vokalo havas vortojn kiel <aueue>, parolo en la tahitia lingvo por "problemo"...

D6: Diversaĵoj

Jen mizero! Zamenhofo ne nur donis al lia elpensintaĵo malbonan fonotaksian sistemon; li eĉ malsukcesis por agnoski ke ĝi bezonas iun ajn! Kiel Esperanto povas aserti ke ĝi estas nature belsona kiam ĝi ne havas regularon pri eŭfonio?

SEKCIO E: DERIVADO (vortofarado)

E1: Enkonduko

Zamenhofo metis longan laboron en krei gamon de unuforme aplikeblaj prefiksoj kaj sufiksoj, kiel <-ig-> "fari" (aŭ "kaŭzi, aranĝi por esti farita") kaj <-igh-> "fariĝi" (aŭ "fari ne transitive") - kiel en <blankigi/blankighi>, "blankigi (ion)/blankiĝi (= deveni pli blanka, pli pala)". Malgraŭ tio, liaj originalaj ideoj postulis kelkajn retuŝojn antaŭ ol esti uzebaj, kaj ili ankoraŭ ŝajnas putraj laŭ mi.

E2: Klareco

Ĉi tiuj afiksoj estas ofte nekompreneblaj. En <cigaredujo>, "cigareda skatolo", <-uj-> signifas "(volumon) ujon". Sed ĝi ankaŭ okazas en <Svedujo>, "Svedio" (ne "sveda geto") kaj <pomujo>, "pomarbo" (ne "barelo da pomoj"). Modernaj Esperantistoj simple diras <Svedlando, pomarbo>. Cetere, ekzistas la formo <sendajho>, "dissendo", en kiu <-ajh-> estas "konkreta (?) esprimo de io ajn"; tamen ĉi tiu estas arbitre etendita al formoj kiel <majstrajho>, "majstroverko" kaj <porkajho>, "viando da porko, kolbaso".

E3: Simpleco

Kiu bezonas ĉiujn ĉi specialajn afiksojn? Ĉu ne taŭgas la duvorta esprimo "fari blanka"? Oni ne diru al mi ke ni bezonas kompleksajn kunmetajn regulojn por produkti nedefinite subtilajn poeziajn nuancojn de signifo; la ĉina lingvo ne havas tiajn regulojn, sed ĝi estas fama pro ĝia nuancema poezio.* Krome, se ni bezonas afiksojn kiel <ek-> ("subite"), <-ach-> ("malestimo") kaj <pra-> ("antikva"), kial estas neniu signifo por "pleno", "amato" aŭ "moda adverbeska trajto kvazaŭ la sufikso por akuzativo de modo -en"? Ni povas inventi novajn afiksojn, miaopinie; sed kio determinus kiujn estas jen prefiksoj jen sufiksoj?

E4: Internaciismo

Esperanta pseŭdoaglutina sistemo de afiksa surkreskaĵo estas nur unu ebla pritrakto de la derivado (iniciatita de Volapuko), sed tio estas almenaŭ simpla - oni tion komparu kun la arabaj triliteraĵoj. Se okazas problemoj, temas pri tio, ke Dro

Zamenhofo ŝajnas strange havi antaŭjuĝon malfavore al iu ajn gamo de eblaj afiksaj formoj disvastigitaj tra la tuta mondo de la "klasikaj" lingvoj. Oni komparu la ĝeneralecon de la abstraktaj substantivaj finoj <-ia, -itate, -(t)ion> kun Esperanta uzo de <-eco>. Tiujn <-ion>-vortojn Esperanto komplezigas, sed por agnoskite devigi la kaŝecon de ilia lingvofamilio; sekve <regiono>, "regiono" sed <nacio>, anstataŭ "naciono".

E5: Eleganteco

Mekanika morfologio povas produkti iujn amuzajn strangaĵojn:

- akcidentaj anomalioj - <chieaj>, "ĉiea (pluralo)"; <majstrskribisto>, "mastroverkisto"; <aghighi>, "gajni aĝon".
- falsaj similecoj - <foresta>, "ne prezenta" (anstataŭ "arbara"); <fosilo>, "ŝpato" (anstaŭ "fosileo"); <truanta>, "traboranta" (anstataŭ "veranta").
- labirintaj distingo - <edzighi, edzigi, edzinighi, edzinigi, geedzighi, geedzigi (sinonimoj)> ĉiuj havas la signifon de "nupti".

Kaj poste estas ambiguecoj kiel <kataro> = "muka fluo pro inflamo de muka membrano" fronte al <kataro> = "grego de katoj" aŭ <kataro> = "lando en la araba duoninsulo" aŭ eĉ <kataro> = "membro aŭ kredanto de la katarismo, kristana mezepoka sekto plejparte lokita en Okcitanujo".

Plej stranga de ĉiuj, malgraŭ ĉio, estas la prefikso <mal->, signiforenversanto kiel la prefikso "un-" ĉe la fama trompiga lingvo "Newspeak" (prononco: "Niŭzpik", esperantigite "Niŭzpiko") ĉe la koŝmara verko pri sciencofikcio "1984" de la angla verkisto George Orwell (prononco: "Ĝorĝ Orŭel", esperantigite "Ĝorĝo Orŭelo"). La sola vorto por "male ol bona" estas <malbona>; "ĉipa" estas <malmultekosta>, "lefta" estas <maldekstra> kaj tiel plu. Estas ĝi sprita vortenhavo mallongirejo, sed estas nekonstanta ("suda" devus esti <malnorda>), grincante artefarita (<malmalbona>, "ne malbona"?) kaj erariga (<malodora> ne estas "fetora")!

E6: Diversaĵoj

Esperanto havas specialan sufikson por marki "feminajn" substantivoj: <-in-> (de la germana; en latinidaj lingvoj tio estas diminutivo). Sed ĉi tiu sufikso ne havas ekvivalentan "maskulan" signon - la vireco estas ja kondiĉo taksita kiel fundamenta!

SEKCIO F: LEKSIKONO (fontoj de la vortenhavo)

F1: Enkonduko

Esperanto estas rimarkinda inter la helpolingvaj skemoj ĉar ĝi posedas ampleksan stokon ĉe sia vortaro jam komence, konsistanta de vortoj el diversspecaj eŭropaj lingvoj. Aliflanke ĝi ankaŭ havis precipe deformitajn elektokriteriojn, prenante la formon <tornistro> de la dana <tornister>; <nepre> de la rusa <nepremenno>... kaj tiel plu, por formi strangan gulaŝon da vortoj elektitaj pro ilia kono al eŭropanoj de la deknaŭa jarcento.

F2: Klareco

Ĉi tie, mi uzos la vorton "klareco" kun signifo de havi adekvatan provizon da teknikaj, poeziaj kaj ĉiutagaj vortoj kiuj estu ĝenerale uzeblaj. Zamenhofo estis speciale fervorega en ĉi tiu departemento, ŝtopante liajn "bazajn" vortlistojn kun trivialaj distingo kiel <kiso> "kiso" fronte al <shmaco> "brua kiso", kaj tiel plu; kiu petis ĉi tiujn distingojn?

F3: Simpleco

Ĉi tiu estas la inversa problemo, preteratentita de Zamenhofo. Lingvolernantoj volas havi la kapablon de komenci sian komunikadon kun kiom eble plej malgranda parkerigado de vortenhavo. La angla estas pasable bona ĉi tiurilate, ĉar ĝi estas riĉa el "metonimioj" - paroloj uzeblaj kiel deirpunkto por pli specialecaj terminoj, kaj krome en sinklarigaj kunmetitaj vortoj kiel "arbodomo" (arbaro) aŭ "noktvestoj". Elementa formo de la angla nomita "Basic English" (Baza Angla, prononco: "Bejzik Inĝliŝ", esperantigite "Bejzikingliŝo") reduktas sian esencan vortaron al 850 vortoj; ĉiu lingvo dizajnita ekde la muelo kun pripensita vortfarada efikeco povus principe esti multe pli bona.

F4: Internaciismo

Vortenhavo estas relative supraĵa, nedaŭra flanko de lingvo kompare kun, ekzemple, sintakso (paroli makaronian latinon ne faras el ĉi iun poligloton); sed ĝi estas la unua kaj ofte la unika karakterizaĵo de fremda lingvo kiun homoj

rimarkas, tiel remburi cian Varsoviocentran helpolingvon kun latinidaj radikoj povas esti efika metodo por ĝin ŝajnigi kiel internacia. Anstataŭ ĉi tiu hazarda eŭropa gulaŝo, vera monda helpolingvo devus uzi kiom eble plej multe la du plej vere tutmondajn vortofontojn:

1. Ŭesta kolonia vortenhavo: kolektita kaj/aŭ disvastigita de la eŭropaj imperiaj potencoj - <ĉokolado, hotelo, kanguruo>.

2. Internacia scienca vortenhavo: vortoj kutime konstruitaj de latina, greka aŭ angla radikoj por ĵus klasifikataj fenomenoj - <eŭterioj (placentataj mamuloj), radiumo, interferometro>.

Estus eĉ pli internacie akcepti ankaŭ tutmonde agnoskitajn ĉinajn aŭ hindiajn vortoj, kiel "tao" aŭ "karmo", se almenaŭ ekzistus kelkaj... arabaj vortoj, eble.

F5: Eleganteco

Multaj semantikaj radikoj de Esperanto estas mallerte bazitaj en la devena ortografio anstataŭ la efektiva prononcado, kiu aperas parenteze en la tujaj ekzemploj:

"kaj": moderna greka <kai> ("ke"); Esperanto <kaj>.

"pilko": pola <piłka> ("piŭka"); Esperanto <pilko>.

"birdo": angla <birdo> ("berd" aŭ "bed"); Esperanto <birdo>.

"boato": angla <boato> ("boŭt"); Esperanto <boato>.

"pugno": itala <pugno> ("punjo"); Esperanto <pugno>.

"soifo": franca <soif> ("sŭaf"); Esperanto <soifo>.

"fraŭlino": eksmoda germana <Fräulein> ("frojlajn"); Esperanto <fraulino>.

Kaj, antaŭ paroli plu, kie estus Esperanto se iu ajn el ĉi tiuj lingvoj ŝanĝus sian ortografian sistemon?

F6: Diversaĵoj

Esperantigitaj loknomoj ofte aspektas, kvazaŭ ili estus transliterita en cirilan alfabeton kaj poste denove en latinan alfabeton neglektante la prononcon:

"Washington", originala ortografio (prononco: "Ŭaŝinton", akcentita en la vokalo "a") fariĝas <Vashingtono>, "Jamaica", originala ortografio (prononco: "Ĝamajka") fariĝas <Jamajko>, "Guantánamo", originala ortografio (prononco: "Gŭantanamo", akcentita en la dua vokalo "a") fariĝas <Gvantanamo>...

SEKCIO G: KONSTITUADO (partoj de la frazo)

G1: Enkonduko

Esperanto iras sian vojon troige, markante kiun parto de la frazo estas ĉiu vorto, per ĝia bonorda sed iel ridinda fina vokala sistemo:

Finaĵo	Klaso	Ekzemplo	Notoj
<-a>	Adjektivo	<viva>	- plus kazo kaj nombra konkordanco.
<-e>	Adverbo	<vive>	- eĉ iuj adverboj prenas la finaĵon <-n> post la finaĵo <-i>.
<-i>	Infinitivo	<vivi>	- sed personformaj verboj finas per <-s>.
<-o>	Substantivo	<vivo>	- fleksio por kazo kaj nombro.
<-u>	Imperativo	<vivu>	- melodrama ekkrio.

Ĉi tiu impona skemo estas bazita sur la ideo laŭ kiu ĉiu verbo havas unu asociitan (egale bazan) substantivon, adjektivon, kaj tiel plu - ideo kun alloga mieno de simetrio kaj logiko, kiu, tamen, montras esti fatale difektita.

G2: Klareco

Nelingvistoj malofte komprenas ke la gramatikaj kategorioj kiel "adjektivo, prepozicio" estas bazitaj ne sur universalaj logikaj principoj sed sur pragmate konstruitaj konvencioj en ĉiu lingvo - ekzemple, kie la angla uzas adjektivoj kiel <kolera>, Yoruba dependas de verboj kiel <bínú> (prononco: "binu"), "esti kolera". La kategorio de "substantivo" estas esence universala, sed Zamenhofo ne povas preni ĝian aplikon kiel garantiita; kion havas komune la vortoj "evento, tineo, graveco, tago, akvofalo, Esperanto", escepte la fakton de esti "substantivoj"? (Oni ignoru la propagandistojn kiuj ankoraŭ asertas ke la esperantaj "radikoj" estas kategorioj semantikaj primitivaj; la oficialaj gramatikoj de la Akademio de Esperanto ne akceptas tion.)*

G3: Simpleco

Estas hordoj da superfluj esceptoj kaj neregulaĵoj. Numeraloj, prepozicioj, "korelativaj vortoj", konjunkcioj, modifiantoj, artikoloj kaj tiel plu estas, ili ĉiuj,

paroloj kie la regulojn oni rajtas neglekti; pronomoj eĉ formas sian propran secesiintan frakcion, unuforme finanta per <-i> anstataŭ <-o> kaj fleksianta por la kazo sed ne por la nombro.

G4: Internaciismo

Esperantaj vortoklasoj estas bazitaj sur la tradicioj de klasikaj gramatikoj latina kaj greka, tio kio apenaŭ taŭgas por multaj eŭropaj lingvoj, eĉ ne parolante pri la ĉina lingvo. La hungaroj ne kutimas uzi prepoziciojn; la germanoj devas lerni ke la adverboj ne estas kiel la bazaj adjektivoj; kaj la slavoj devas elporti artikolojn...

G5: Eleganteco

La muldoforcitaj vortoj el ĉi tiu sistemo povas tordi ilin horore.

<-a> <boa, gala, penta, praa> = "de geedziĝo, de hepata bilo, pentinta, antikva".

<-e> <die, male, obee, ree> = "modo de Dio, kontraŭe, obeeme, denove".

<-i> <ekkrii, mini, peni, scii> = "krii subite, meti minojn, provi, Koni certe kaj precize".

<-o> <lego, mono, pesto, sago> = "legado, ekonomia devizo, plago, vergeto kun pinto kiun oni ĵetas per arko".

<-u> <fluu! ghuu! skuu! instruu!> = "ci movu cin flue! ci havu ĝuon! ci kaŭzu skuon! ci ion lernigu!"

G6: Diversaĵoj

Esperanto estas kurioze volonta pro viktimoferi agnoskeblecon en radikofinaj vokaloj - "Asia" fariĝas <Azio>, "voce" (latina/itala, prononco "voke" aŭ "voĉe") fariĝas <vocho>, preskaŭmonda formo "kofi/café" (prononco kofi/kafe') fariĝas <kafo>, kaj tiel plu. Se almenaŭ ekzistus malpli da gramatikaj klasoj kiujn distingi, eble iuj substantivoj povus fini per <-a> aŭ <-e>... kio ankaŭ farus la rimojn en esperanta poezio pli interesaj!

SEKCIO H: VERBOJ (tempoj, subjunktivoj kaj tiel plu)

H1: Enkonduko

La verbo estas dizajnita por aperi nebule latineska, sed kun siaj "tempoj"; jen, preterito, prezento, futuro kaj subjunktivo/kondicionalo; kaj ankaŭ kun siaj fleksiaj participoj. Tial la verbo denove plej similas polurita versio de pola lernolibro.

H2: Klareco

Zamenhofo prenis kategoriojn kiel infinitivo, participo kaj subjunktivo kredante ke tiuj kategorioj estas universalaj konceptoj. Oni rimarku precipe lian neglekton por difini la subtilajn diferencojn inter simpla tempo ("mi vidis") kaj komponitaj tempoj ("mi estas vidinta") - ... afero des pli ĉagrena ĉar pasivaj verboj estas ĉiam formataj kiel komponitaj tempoj ("mi estas vidita").

H3: Simpleco

Devus esti evidenta al anglaparolantoj ke specialaj sufiksoj por infinitivoj, futuro kaj subjunktivo estas superflua komplikaĵo. Povus esti malpli evidenta ke la angla mem estas superkompleksa iel, kun sia pasiva voĉo, sia rezidua konkordanco kun la subjekto - prudente evitata en Esperanto, kaj kun sia deviga tempomarkado eĉ kie la kunteksto evidentas la tempon aŭ absurdigas la tempomarkadon. Neniu el tiuj necesas; la futuron, ekzemple oni povas montri kun helpoverboj, ekzemple; aŭ, alternative, kun adverboj ("baldaŭ"); aŭ se oni insistas, kun laŭvola afikso ("post").

H4: Internaciismo

Unu karakterizaĵo de verboj aperas en preskaŭ ĉiuj homaj lingvoj, kvankam bagateligita en tradiciaj latinebazitaj lernogramatikoj: la aspekto, la distingo inter perfektivo (proksimume, la "simpla evento aŭ ago") kaj imperfektivo ("daŭranta stato aŭ konduto"). Esperanto apenaŭ ebligas marki la aspekton, dependante de nefidinda sufikso (<-ad> "kontinua" aŭ "gerundio") kaj diskutindaj aplikoj de participoj (ekzemple <estas fermata>, kiun iuj tradukas kiel "estas aktuale fermata" kaj aliuloj kiel "oni estas fermanta ĝin").

H5: Eleganteco

La realaj formoj de ĉi tiuj fleksioj (<-os>? <-inta>?) ne konvinkas. La plej malbona estas <-u>, la imperativo. La plimulto da lingvoj, pro evidentaj kialoj, aranĝas ĝin por ke ordonoj povu esti donitaj per la plej baza verba parolo, ne per speciala, unike fleksiita formo!

H6: Diversaĵoj

Zamenhofo ankaŭ adoptis slavan pritrakton de tempoj en citoj de parolado: kie la angla lingvo raportas "ni estas!", jen rekte kiel "ili diris ke 'ni estas'"! aŭ nerekte kiel "ili diris ke ili estis", esperantoparolantoj kaj slavoĵ nepre diras (efektive) "ili diris ke ili estas" (tempo rekta, ĉio alia nerekte). Ekzistas ankaŭ iuj sufiĉe komplikaj problemoj kiujn oni ignoris en la esperanta uzo de refleksaj pronomoj kaj aktiva/pasiva distingo.

SEKCIO I: SUBSTANTIVOJ (kazo, nombro kaj tiel plu)

I1: Enkonduko

La substantivoj de Esperanto fleksias samtempe por nombro kaj por kazo; tio estas, pli ol tio konsiderata kiel necesa ĉe la plejparto da eŭropaj lingvoj. Oni komparu la anglan frazon "yesterday you hit the (three) white sheep" (kazo, tempo kaj nombro lasitaj al la vortordo kaj la kunteksto, prononce "jesterdej ju hit de (dri) ŭajt ŝip") kun la esperanta versio: "hieraŭ ci/vi frapis la (tri) blanka(j)n ŝafo(j)n" (kazo, tempo kaj nombro superflue esprimitaj de sufiksoj).

I2: Klareco

La esperantistoj neniam provis klarigi kiujn estas la aplikoj de kazoj aŭ pluraloj. La kazoj estas ekstreme malfacilaj; sed eĉ la pluraloj ne estas tiom maneĝeblaj kiel uzi la maĉgumon. Kial ekzistas la pluralo de "nulo sekundoj, unu punkto nulo sekundoj"? Efektive, kion utilas pluraligi la formon "du sekundoj"? Kial "rizo, tritiko, maizo" uzas singularon, dum "nuksoj, bananoj" uzas pluralon?

I3: Simpleco

Devigaj fleksioj estas nekonsilindaj. Ĉu ne povis Esperanto imiti la japanan, kiu esence funkcias sen pluraloj ("unu ninĝo", "du ninĝo(j)..."), aŭ la tagalogan, kiu markas nombron nur se tio ŝajnas grava (uzante apartan regulan pluraligan vorton)?

La samo koncernas kazon (se ne des pli). La esperanta sufikso <-n> ne nur estas deviga por la akuzativa funkcio, sed ĝi aperas ankaŭ ĉe tempaj esprimoj, direktaj adverboj, komplementoj de moviĝo kaj celoj de moviĝo - tial <Lundon rajdu chevalon norden dek mejlojn en Londonon!>. Kaj tamen... iuj tipoj de substantiva frazo (infinitivoj, numeraloj, <multe da homoj, kaj tiel plu) ne povas esti markitaj per kazo, kaj tiuj ŝajne funkcias perfekte feliĉaj sen markilo de kazo.

I4: Internaciismo

La lingvoj ne nur disopinias pri kiel indiki kiun komponanto de frazo estas la subjekto (la rusa uzas substantivajn finaĵojn, la japana havas partiklojn post substantivaj frazoj, la svahila uzas markadon de la verbo, kaj la ĉina dependas de la vortordo), sed eĉ pri kiel difini ĉi tiun ideon de "subjekto." Eknun mi atentigos ke la neformala angla frazo "It's me!", prononce "Its mi!, en Esperanton "Tio estas mi!" povas esti malbona latino, sed ĝi estas bona turka lingvo.

I5: Eleganteco

Kial <-j>? Povus esti rekonebla al la italoj (unu procento de la monda loĝantaro) kiuj uzas la afikson <-i> kiel regula plurala signo, aŭ eĉ al la slavoĵoj (kvin procentoj) kiu uzas cirilan literon kun simila sono; sed komparu tion kun <-s>, uzita tra la tuta Centra/Okcidenta Eŭropo (Hispanujo, Germanujo, Francujo, Britujo...) kaj iliaj kolonioj: kvardek procentoj de la homaro! Aliflanke, <-n> kiel markilo de akuzativo ŝajnas esti bazita en unu peco de germana morfologio; la finaĵo <-m> povus esti pasita elekto pli bona. Kaj oni alvenas en pripenson: ĉu iam Zamenhofo eksplicite malpermesis la sufiksitan ordon <shafonj>, aŭ ĉi tio estas lasita al "prudento"?

I6: Diversaĵoj

Se substantivoj estus formitaj el participoj regule, la vorto por "individuo kiu aktuale esperas" - kaj por la lingvo - estus <esperantulo>. Parenteze, mi ricevis multajn plendojn de Esperantistoj kiuj imaĝas ke estas nekohere deziri samtempe

espriman klarecon kaj gramatikan simplecon; ŝajne ili ne povas imaĝi (ekzemple) distingadon inter singularo kaj pluralo sen specialaj aldonaj reguloj kiuj faras el la konkordanco de nombro devigan parton de la morfologia sistemo...

SEKCIO J: PRONOMOJ (kaj demonstrativoj)

J1: Enkonduko

La sistemo devus esti konata al la anglaparolantoj, kun sia ununura vorto por "ni" (ĉu inkluziva ĉu ekskluziva), unu ofta vorto por "vi" (jen singulara konatulo jen ĝentila pluralo), kaj kun deviga distingo en la singularo (nur) inter formoj paralelaj al "li", "ŝi" kaj "ĝi".

J2: Klareco

Malmultaj lingvoj distingas kiel ni, parolantoj de la angla, faras inter "iu(j) fiŝo(j)" kaj "la fiŝo(j)" (la angla nomo "fish", de prononco "fiŝ" preskaŭ kiel en Esperanto, kutime ne ŝanĝas en pluralo); kaj klarigi la kialon de ĉi tiu distingo bazita en la difinita artikolo, estas preskaŭ neeble. Oni konsideru ankaŭ la neantaŭvideblan (al la anglaparolantoj) vojon kiun artikolo <la> sekvas en <dek minutoj post la unua>, <la dio benu cin> (aŭ "Dio benu cin"), <la birdmigrado estas mirinda>.

J3: Simpleco

Ĉu ne povus Esperanto funkcii sen artikoloj, kaj manaĝi pronomon kaj tiel plu kiel regulajn substantivojn? Aŭ se la pronomoj vere bezonas sian propran sistemon, kune kun "posesivaj adjektivoj" <mia, lia> kaj tiel plu, kial la demandovorta pronomo devas fuŝe miksi formon kiel <kia> = "kiu speco", kun formo kiel <kies> = "de kiu" (litovastilo genitivo)?

J4: Internaciismo

Esperantaj vortoj por <kiu, kio> agas samtempe kiel demandovortoj kaj kiel relativaj pronomoj - komercmarka mistrajto de la eŭropaj lingvoj kiu respondecas pri tiaj malnecesaj dubasencoj kiel "Ĉu ci demandis la homon kiu tion faris?" Oni komparu, ekzemple, kun la hindia, kie demandovortoj komencas per

<k-> sed ilia relativaparagrafaj ekvivalentoj havas la formon <j->.

J5: Eleganteco

Oni rimarku ke la formoj <kiu, kio> ne aperas en la listo da pronomoj; male, ili estas en aparta neregula subfamilio, la tiel nomitaj tabelvortoj. Ĉi tiuj estas vortoj faritaj per mikspoto de konceptoj kiel "ĉiuafero, kiuklaso, neloko, iutempo, tiumulto"; ili nature formas tabelon kun kolumnoj kiel "<chIU> kaj vicoj kiel <-e>, intersekanta ĉe <chie>. Sed la krado ne havas kolumnojn por "ie poste", "iel", "'ĉiel", aŭ "nun")", kaj neniuj vicoj por "kelkgrade, kielofte" aŭ "kiudirekte"; tiuj aloj bezonas arbitran fuŝagadojn, tial aperas triobloj kiel <ki-am, ti-am, nun> fariĝ <estas, estas, religiulino>. Pli malferma sistemo (kie ekzemple "io" estas simple "kelka objekto") farus la tutan tabelon superflua.

J6: Diversaĵoj

Ĉi tiuj vortoformoj eble ne montras multan regulecon, kun la senco de sekvi la regulojn de la normalaj substantivoj, sed ili alte poentas por unuformeco, laŭ la senco de "ĉu ci diris <li estas>, <ni estos> aŭ <mi estus>?"

SEKCIO K: ADJEKTIVOJ (kaj numeraloj)

K1: Enkonduko

La adjektivoj de Esperanto havas supraĵan latineskan finaĵon <-a>, kun aldonaj fleksioj por la konkordanco kun la substantivo kiun ili modifas. Se en ĉi tio ekzistas iom da logiko, ĉu tio ne implicus meti similajn signojn en la artikolo <la>? Tiel funkcias la aferon en la naturaj lingvoj. Zamenhofo estis kopianta ĉi tie: se konkordo taŭgas ie ajn, la artikoloj estas tie kie la konkordo taŭgas.

K2: Klareco

Kiaj vortoj apartenas al la kategorio-<a>? "Tria", sed ne "tri"; "multaj" kaj "ĉia", sed ne "ĉiu"; "lia" kaj "onia", sed ne "kies"... se nur Zamenhofo estus iam sciinte pri determinantoj, vortfarada klaso kiu kovras, ekzemple, artikolojn, pronomojn kaj korelativojn, eble la kategorioj ne estus finintaj kun tia fuŝado.

K3: Simpleco

Antaŭ ĉio, kial ho kial donis Zamenhofo al lia "simpla" internacia lingvo devigan kazon kaj nombran konkordancon? Jen tipa frazo de Esperanto <la domoj estas novaj> - kiu estas sur la plej fuŝa ekstremo de la skalo eĉ laŭ eŭropaj ŝablonoj. Kompare, la franca uzas la formon <les maisons sont nouvelles> (prononco: "le mezon' son nuvel'"), kie la "plurala konkordo" estas silenta; la germana uzas la formon <die Häuser sind neu> (prononco: "di haŭzer sind noj"), kie la predikato ne montras konkordon; aŭ la rusa uzas la formon <doma novi>, kiu ankaŭ ja havas konkordon, almenaŭ ĝin kompensas permesante onin ke oni forigu la verbon. Eĉ Volapuko ne eraris pri ĉi tio - <doms binom nulik> (prononco: doms binom' nulik'!

K4: Internaciismo

La angla foje dependas de "adjektivo" por diri frazon kiel "la novaj domoj", sed multaj lingvoj manaĝas la aferon malsame. La araba uzas substantivan apozicion ("la novaĵoj la domoj"); la japanan preferas solvon kiun la morfosintaksistoj analizas kiel verbojn de stato ("estante-nova domo").

K5: Eleganteco

La "bazaj" nombroterminoj <tri, triopo, tria> estas troŝarĝita miksamaso; farante mokadon de la regula skemo, jen radikoj/substantivo/adjektivo skemo, kiun tiuj nombroterminoj imitas (oni notu ekzemple ke tiom <tri> kiom <tria> povas okazi kiel jen argumento jen modifikanto). Frapontaj efikoj inkluzivas la barokan selektadon de bezonataj sufiksoj nombrorilataj por <triole, trifoj, trioje>.

K6: Diversaĵoj

Kial, escepte pro Eŭropa tradicio, ni bezonas unuvortan etiketon por 10 al la kubo, <mil> anstataŭ "dek cent", sed ne por 10 al la kvara potenco, <miriado> aŭ 10 al la kvina potenco ("cent mil")? kaj etiketon por 10 al la sesa potenco, <miliono>, sed ne por 10 al la sepa potenco ("dek milionoj") aŭ 10 al la oka potenco (japana parolo "oku")? Se Esperanto estus ĉefe konstruita per la internacia scienca sistemo de prefiksoj ĉi tiu povus pravi, sed mankas signoj de ke Zamenhofo iam aŭdis pri terminoj kiel "kilogramo" kaj tiel plu. Ja <pico> estas la parolo de Esperanto por fama itala kuiritaĵo, "pizza" (prononco: "pica")!

SEKCIO L: ADVERBOJ (kaj prepozicioj)

L1: Enkonduko

Ĉi tiuj kategorioj estas malpli fidindaj ol la plimulto da personoj supozas. La latino havas foje klarajn "adverbojn" kaj "prepoziciojn", sed la vjetnama uzas nenium (ĝi nur bezonas flekseblajn adjektivojn kaj verbojn); eĉ multaj anglaj vortoj paralelaj al formoj de Esperanto kiel "kvazaŭ" aŭ "krom" estas malfacile klasifikeblaj. Jes, la adverboj estas plimulte simplaj verbomodifiloj kiel "nun"; sed ĉi tio apenaŭ kovras okazojn kiel "malgraŭ" aŭ "jen".

L2: Klareco

La finaĵo <-n> de Esperanto simple anstataŭas kelkajn prepoziciojn, modifas la signifon de aliaj, kaj neniam rilatas kun la ceteraj. Zamenhofo ne nur miksis konfuzo ĉi tiujn prepoziciajn funkciojn en lia kazosistemo, sed li ankaŭ faris ilin oficiale malklaraj.

L3: Simpleco

akuzativaj finaĵoj estas efika vojo por liberigi la vortordon, sed kiel statistike tio aperas laŭ trarigardado de la naturaj lingvoj, la rezulto montras kunrilaton al la mala direkto! La sistemoj de kazo por la substantivo estas "dependemarka" trajto, ligita kun relative severa vortordo - la gramatikaj sistemoj kun la malplej limigaj reguloj de vortordo estas forte "kapomarkantaj". Tio estas, ili montras subjekta akordo ĉe la verbo, meĥanismo kiun Zamenhofo maronforĵetis tute de Esperanto.

Kaj la efekto de la bulo en la tapiŝo ja ne bezonas halti nin en la tasko de plibonigi la ĝeneralan ebeneson de la tapiŝo. Pri la kazo, ne necesas ke la sintaksaj substantivaj roloj estu montrataj per iliaj finaĵoj - konstruita lingvo estas libera por sekvi la ekzemplon de la lingvoj, kiuj neniun afikson havas. Marki la kazon per prepozicia sistemo anstataŭe, estus perfekte funkcia - aŭ ne tion fari; denove, tio ne estas nepra. Sed vortordo ne estas elektebla aldonaĵo, ĝi estas universala; ĉiuj frazoj necese havas vortan ordenon, kaj ĉiuj lingvoj faras iun uzadon de la remodeligoj por distingi eblajn signifojn. Esperanto povus ankaŭ agnoski ke ĝi havas regulon laŭ kiu la vortordo estas implicite subjekto - verbo - objekto. Kaj se tion oni ja starigis, kiu bezonas devigan finaĵon <- n>?

- Deviga konkordo en la adjektivoj.

<La vortfinaĵoj estas komplikaj> "La vortfinaĵoj estas komplikaj".

La angleparolantoj estas memkompreneble ĉiam kulpigitaj pro sekteca denaskalingva tendenco kiam ili plendas pri ĉi tiu trajto, sed estas empiria fakto, ke Esperanto prenas sian ĉiean adjektivan konkordon al ekstremo ne komuna en naturaj lingvoj kaj preskaŭ sen precedencoj en desegnitaj lingvo (ci vidu la sekcion K3). Tio estas ĉio bonega por permesi al la parolantoj ke ili uzu adjektivan konkordon se tiel ili estas jam kutimiĝitaj por registri spuron pri kiu adjektivo konkordas kun kiu substantivo; sed altrudi la regulon al ĉiu, eĉ en la vasta plimulto da kunteksto kie ne ekzistas solvenda ambigueco, metas ekstran barieron en la vojo de miliardoj da potencialaj esperantoparolantoj. Zamenhofo mem agnoskis tion tro malfrue, priskribante adjektivan konkordon en 1894 kiel "superflua balasto".

Tamen, ĉar ĉi tiuj du stultaj eraroj interagas, ni havas unuopan klaran frontekuranto:

- Deviga konkordo por markado de la kazo en la adjektivoj

<Rigardu la komplikajn vortfinaĵojn!> "Rigardu la komplikajn vortfinaĵojn!"

Kiel kutime, mi bonvenigas retrokuplon: ĉiuj disopiniantoj kun alternativaj kandidatoj por la Unuo plej Stulta Eraro de Zamenhofo devus provi mian

leterkeston, jen, justin.byam.rye@gmail.com (justin punkto byam punkto rye atelo gmail punkto com). Ci vidu la sekcion Z.

SEKCIO W: MISFORMOJ

Nur por facilanima reliefiĝo (ĉi tiu paĝo ne pretendas esti serioza kritikado!) jen kelkaj hazardaj inherantaj produktoj el la neta sistemo de Esperanto por vortofarado per radikokunmetado: vortoj, kiujn oni povas interpreti per ajna el du senrilataj signifoj.

Esperanto	Signifo A	Signifo B
<acheto>	"aĉeto"	"malgrandaĉa aĵo"
<alterni>	"alterni"	"terni al"
<avaro>	"avaro"	"grupo da avoj"
<dieto>	"dieto"	"malgranda dio"
<dignagho>	"dignaĝo"	"naĝo en digo"
<ekstero>	"ekstero"	"ne plu ekzistanta tero"
<elfaro>	"elfaro"	"grupo da elfoj"
<filino>	"filino"	"malneta lino"
<galero>	"galero"	"guto de galo"
<kolego>	"kolego"	"granda kolo"
<kukurbo>	"kukurbo"	"urbo da kukoj"
<lavenda>	"lavenda"	"el lavendo"
<lekanto>	"lekanto"	"iu kiu lekas"
<marmito>	"marmito"	"mito de maro"
<modulo>	"modulo"	"ulo laŭ la modo"
<paperaro>	"paperaro"	"eraro de la papo"
<persono>	"persono"	"sonoperilo"
<pretenda>	"pretenda"	"bezono de esti preta"
<rapido>	"rapido"	"spruĉo de rapo"
<regula>	"regula"	"pri rega ulo"
<revido>	"revido"	"ido de iu revo"
<sardino>	"sardino"	"ino de Sardo o de Sardinio"
<sentema>	"sentema"	"sen temo"
<sukero>	"sukero"	"guto de suko"
<urino>	"urino"	"ino de la uro"

Tiuj ĝuste estas la unikaj kiujn mi opiniis plej indaj de savi; nun, kiam Geoff Eddy (prononce: Ĵof Edi) forigis la pli longan liston kiun li kutime subtenis. Kaj por la benefico de tiuj kiuj insistas, ke mi justifiku min pro ĝia menciado, mi pli ĝuste emfazus ke mi ne prezentas ĉi tiun liston kiel indikaĵo de ke Esperanto havas pli da tiaj ambiguecoj ol la angla - ili ĝuste estas amuzaj!

Ĉi tio dirite, misinterpretablaj anglaj vortoj kiel "unless" ne estas rigore komparablaj, ĉar natura lingvo estas difinita per la uzado de ĝia denaskaparolantaro; la konjunkcio derivita de la mezepoka angla esprimo kun signifo <pri malpli> povas ŝajni sinonimo por "pli multa", sed anstataŭe ĝi havas la signifon en Esperanto de "ja jen, escepte se ĉi tio okazas alimode... (kun posta persona verba formo)". La unikaj lingvoj kiujn oni difinas per la priskribaj gramatikolibroj kiun oni uzas kiel lerniloj, estas la artefaritaj lingvoj; por ili, se la reguloj permesas forĝaĵon kiel <fi - lino> (literale "fia lino") tiam tiu vorto estas tiel legitima kiel alia ajn. Nu, kaj la misdivida problemo ne estas nepra en konstruita lingvo; unue, la dividostrekoj povus esti devigaj.

SEKCIO X: KOMPAREBLAĴOJ

La propagandistoj de Esperanto malofte ŝajnas esti bone informataj pri la ordinaraj lingvoj de la mondo (speciale ekster Eŭropo). Tio ĉiam estas bedaŭrinda, sed ekzistas kelkaj apartaj okazoj, pri kiuj mi deziras, ke ili estus studotaj de mia korespondatoj legus anstataŭ lanĉi rekte deklamojn pri la unika grandiozeco de Esperanto.

a) Ekzistis unu homo en la deknaŭa jarcento kiu estis inspirita en la originala cerboŝtormo de konstrui artefaritan internacian helpolingvon (uzante regulan, supoze simplan gramatikon, makaronan leksikon, kaj pseŭdogluantan skemon. Iuj opiniis ke ĉi tio estis brila, kaj startis evangeliante por konvinki ĉiun en la mondo pro lerni ĝin. Ili akiris malgranda sukceson; la helpoplanlingvo ekimpresis ridinde la malmultajn membrojn de la larĝa publiko, kiuj ekzamenis ĝin. Sed ĝiaj apogantoj rifuzis ĉiun proponon pri ke ili sekvis la malĝustan skemon.

Jes, mi estas parolante pri Volapuko, kreita en 1879 de la Moŝta Pastro Johann Martin Schleyer (prononco: Johan Martin Ŝleyer). Jen la sola elstara konkuranto de Esperanto, pri kiu mi volonte agnoskus ke ĝi havas pli malbonan desegnaĵon. Kiam la helpolingva movado abandonis ĝin ekestis kreskado en anaro - demonstrante ke estas nenio malĝusta ĉe alterni la ĉevalojn meze de la ĉevalkurado kiam la unika ĉevalo kiun ci skurĝas estas morta. Kaj post tiu epoko,

multaj pli rafinitaj desegnaĵoj fariĝis disponeblaj. Ci ne uzas komputilon masonita laŭ projekto de Charles Babbage (prononco: Ĉarls Babiĝ'), do, kial ci volus prototipan helpolingvon de la deknaŭa jarcento?

b) Ununura lingvo el la lingvoj konitaj de Zamenhofo pasis dum lia vivo (1859 - 1917) de esti morta lingvo artefarite instruita de gramatikaj libroj al esti lingvo vere viva, kun forta komunaĵo el milionoj da parolantoj kiuj ĝin uzas kiel sian ĉiutagan instrumento de komunikado. Ĉi tiu singulare sukcesa evento estis larĝe ŝuldita al la laboro de unu fanatika lingvoplanisto naskiĝita en cara rusa gubernio en la jardeko de 1850.

Nature, mi estas citinta la hebreon. Antaŭ ol esti resurektita per la klopodoj de Eliezer Ben-Yehuda (prononco: Eliezer' Benjehuda, vivanta en la jaroj 1858 - 1922), ĝi havis pasis 2000 jarojn kiel la kultura interlingvo de la poliglota juda diasporo, laborante tre taŭge kiel internacia helpolingvo eĉ kvankam ĝi estis morta ŝtono (sen denaskaj parolantoj). Ci observu ke la samaj aŭ memaj cionistoj estis pli fluantaj per eŭropaj lingvoj kiel la germana, tial la hebreo kun kiu ili edukis siajn idojn estis iom ŝestigita versio.

c) .Milionoj da homoj en la mondo hodiaŭ uzas kiel ilian precipan instrumenton de komunikaĵo ion, kio startis kiel konstruita lingvo, intence ellaboris en la lasta duono de la dudeka jarcento. Ja, la plej granda tia lingvo estas pli granda ol la pliparto de la mondaj "naturaj" lingvoj, montrante, ke "artefarita" origino estas ne bariero kiel longa kondiĉe ke la popolo havu solidan praktikan kialon por adopti ĝin.

Jes, mi estas parolanta pri la ĉina gestolingvo. Ĝi eble estis plene ellaborita nur ĉe la fino de la jardeko de 1950, sed ci ne faru la eraron de opinii ke la gestolingvoj por la surduloj estas iel ne realaj lingvoj! La ĉina gestolingvo havas flekseblan, povantan gramatikon, bone stokitan vortoprovizon, kaj komunaĵon de denaskaj parolantoj kun forto de pluraj milionoj. La proksimaj ĉevaloj de la kurado inkluzivas la amerikan (usonan) gestolingvon kaj la hindopakistan gestolingvon.

d) Foje oni argumentas ke la granda problemo adoptante ekzistantan lingvon kiel internacia helpolingvo estas, ke neniu volas esti "duaranga civitana" parolanto. Sed se tiu estas vere la obĵeto al la monda angla lingvo, kion do kontraŭ alternativo, kiu estas tiom simila al la angla kiom ci povus akiri al angla en kerna sintakso kaj kerna leksiko, kvankam kun, ekzemple, pli simpla ensemblo da vokalaj distingo (nur la duono de mia propra aborigena angla dialekto)? Unu lingvo kies parolantoj estas neniam irontaj al ĝoji rangon por moki cin ĉar ci havas senprestiĝan akcenton, fiaskon uzante "aŭtentikan gramatikon", aŭ forgesante iun absurdan ortografian regulon?

Nature, mi referas nun pri la skota lingvo. Ci ne konfuzu ĝin kun la

gaelaskota lingvo simila al la gaelairlanda lingvo. La skota lingvo ĝuste estas kiel la angla, sed tiuj vomigaj amerikanoj (usonanoj) ĝin ne parolas, kaj ĝi ne havas oficialan "ŝablonan" formon, jen parolita, jen skribita! Aŭ ci povis piki kreolon kun pugnoplenujo da parolantoj kaj aromo de la Pacifiko, kiel la pitkarna lingvo. Tamen tiaj alternativoj neniam altiris ajnan intereson, ĉar ekster siaj lokaj regionoj neniu iam bezonas lerni ilin, kaj la plimulto de la monda loĝantaro neniam lernos lingvon escepte se ĉi tio necesas.

SEKCIO Y: FUNDAMENTO

"Sed, ja, Justino - ci devas esti konscia pri ke ekzistas oficiala fonto por ĉiuj respondoj pri la gramatiko de Esperanto:"

LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO

Ludoviko Lazaro Zamenhofo

GRAMATIKO (angla versio)

(Noto pri la tradukado: por eviti maldezirendan retradukadon el la angla al Esperanto, en ĉi tiu sekcio, ĉiujn citaĵojn el la Fundamento de Esperanto oni ĉerpos el la originala verko).

Iuj (kiel la aŭtoroj de "Ci lernu Esperanton al ci mem") pretendas, ke la dek ses reguloj en ĉi tiu dokumento konsistigas ĉirkaŭprenantan gramatikon de la lingvo Esperanto. Aliuloj komprenas kiom komika estas tiu ideo, sed ili diras, ke ĝi estas la listo de ĉiuj "netuŝeblaj" reguloj kiujn la esperantistoj ne rajtas modifi. Tio ne havas grandan senson ajn, ĉar iuj de la frue proponitaj reformoj kiujn estis ĵetitaj en unu politikan futbalon kaj kalcitritaj eksteren kiel "Ido", estus viditaj kiel perfekte kongrua kun ĝi... kvankam, kiel ajn ĝi estus, mi persone preferis vidi ĝin kiel barelon da fiŝo kiu ne paradus turnante ĝis la fajra fronto.

A) LA ALFABETO

La reguloj ne komencas kun la Regulo 1, sed kun kompleta sennombra sekcio, kiu starigas iel kion la amuzaj literoj signifas fonetike. Ĉi tion enŝovigi en specifikantan dokumenton implikas ke malkiel ekzemple, la kornvala lingvo, kiu estas daŭre kornvale sendepende kiel ci skribos ĝin, Esperanto devas esti skribita per ĉi tiu preskribita ortografio. Se ci uzas la skribsistemon de Elvish Tengwar,

prononce "Elviŝ Tengŭar" (<http://www.catb.org/esr/tengwar/esperanto-tengwar.html>), ĝi ne plu iel estos Esperanto. Sed ni preteratentigu tiun lunatikecon kaj ni procedu kun:

B) PARTOJ DE LA PAROLADO

... Apartaĵo kiu plejparte ne traktas ĉe difini la leksikajn kategoriojn de Esperanto, sed ĉe ilin preni kiel senkondiĉe garantiitaj kaj ĉe priskribi kiel ili estas fleksiataj.

1. Ne ekzistas nedifinita artikolo. Ekzistas nur difinita artikolo "la", egala por ĉiuj genroj, kazoj, kaj nombroj.

Iuj "tradukoj" de ĉi tiu dokumento adicias piednoton ĉi tie por diri ke, en Esperanto, la uzado de artikoloj ĝuste estas kiel en franca aŭ germana, sed ke la eksterlandanoj, kiuj havu problemojn povas simple ne uzi ilin. Tio estas mito; kiam ci luktas por kompreni kion franca esperantoparolanto estas diranta, la informado transdonita de la artikolo <la> eble estas vitala. Se ĝi estus ornama sensignifa silabo, estus freneze malŝpari dek sesonon de la rulemblo por ĝi!

2. La substantivoj havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du : nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo n. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per de, la dativo per al, la ablativo per per aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

Unue Esperanto havis nur du kazojn, nun ĝi havas tiom da kazoj kiom da prepozicioj - ili estas ĝuste formitaj per la sama maniero de la nominativo. Se ci imagas ke ĉi tio nur estas klopodo de eksplicite la gramatikon de Esperanto al parolantoj de la angla laŭ trajtoj kiujn neniu lingvo havas, ci forgesas ke ĉi tiuj reguloj estas definitivaj: ili diras ke Esperanto havas dativan kazon, do estas hereze malagnoski tiun fakton!

Ekzemploj: radiko patr, la patr|o, al la patr|o, de la patr|o, la patr|o|n, por la patr|o, kun la patr|o, la patr|o|j, la patr|o|j|n, per la patr|o|j, por la patr|o|j.

Ĉar evidente ni bezonas ke estu montritaj ekzemploj de kiel gluigi la sufikson <n> al vorto, sed ĝian funkcion oni povas eksplicite ripetante la etikedon "objektiva kazo". Kaj la prototipa substantivo estas inherente vira vorto.

3. Adjektivoj estas formataj per aldono de "a" al la radiko, kaj kazoj kaj nombroj kiel ĉe substantivoj.

Se la dativo estas indikata same tiel ĉe la adjektivoj kiel ĉe la substantivoj, adiciante la vortan <al>, tiu rimedo signifas ke "al blanka ŝipo" estas <al blanka al ŝipo>, ĉu ne?

La komparativo estas farata per la prefikso "pli" kaj la superlativo per "plej".

Ha, ne, tio ne estas tiel - prefiksante ĝi donus la formon <pliblanka>, "pli blanka"! Esperanto uzas la prefikson, en, ekzemple, <malpli>, "malpli", sed la ĵus citata formo estas fuŝa provo de doni vortordan regulon (la unika de la listo): adverbaj modifantoj kiel <pli> kaj <tre> ("tre") antaŭiran la vorton kiun ili modifas.

Post la komparativo oni uzas la prepozicion ol, ekzemple pli blank|a ol neĝ|o, "pli blanka ol neĝo".

Kial oni nur diras al la francaj kaj rusaj legantoj, ke la prepozicia <el>, estas uzata ĉe superlativoj? Ĉu la reguloj estas malsamaj por ili?

4. La bazaj numeraloj ne estas deklinaciataj. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj.

Konsentite, sekve la numeraloj estas aparta PAROLELEMENTO fronte al la artikuloj, la substantivoj kaj la adjektivoj. Neniam atentigu kazon ĝuste nun: kiuj estas la reguloj por pluraligi la numeralojn? Finfine, la formoj <dekoj> kaj <centoj> okazas en la teksto per Esperanto teksto de ĉi tiu regulo!

La bazaj numeraloj estas: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil.

Tiu ne estas loteca vortoproviza leciono, tio estas elĉerpinta listo, kaj nulo ne estas en ĝi.

La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj, ekzemple kvin|cent tri|dek tri (533). Por la ordaj numeraloj oni aldonas la adjektivan finiĝon a, ekzemple, kvar|a, unu|a, du|a, kaj tiel plu.

La versioj de Regulo 4 ne konkordas ĉi tie. La eldono en Esperanto eldono ripetas la regulojn de konkordo por adjektivoj, dum la aliaj antaŭeniras ĉi tiel:

Por la multiplikaj numeraloj oni aldonas la sufikson *obl*, ekzemple *tri'obl 'a*.

Se nur al la ordinaloj oni estis doninta propran afikson, anstataŭ misklasifiki ilin kiel la adjektivaj formoj de la kardinaloj, vortoj kiel " *triobla* " aŭ " *trioble* " povus esti restintaj kiel nur adjektivaj sensoj de la radiko <*tri*>.

Por la frakciaj numeraloj oni aldonas la sufikson - *on*, kiel *kvar|on|o*, *du|on|o*.

Jen <*tridek duonoj*>, "tridek duonoj"; <*tridek - duonoj*>, "tridek sekundoj"; <*tri dek - duonoj*>, "tri dekduonoj"; la frakcioj estas regulaj substantivoj. Nur estas nedeklinacieblaj la citataj entjeroj: "ci adiciu milonon, mil kaj milionon" estas <ci adiciu milonon, mil kaj milionon>.

Por la kolektivaj numeraloj oni aldonas la sufikson - *op*; por la distribuaj oni aldonas la vorton *po*.

Tio estas klono de la Rusa prepozicia <*po*>, ne unika " prefikso " meritante propran specialan mencion.

Krom tio povas esti uzataj numeraloj adverbaj per aldono de *e* al la radiko; ekzemple, *unu|e*, *du|e*" kaj tiel plu.

Tiuj estas la specifaj ordinalaj adverboj, jen kial la kardinalaj adverboj finiĝis per senelirvojoj kiel <*kvarope*>.

5. La personaj pronomoj estas *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *ili*, *oni*.

Se ci volas diri formon kiel "popolo", kial ci ne adheru tiun vorton? Ci ŝparus specialajn esceptajn pronomojn, kaj ci evitus la kolizion kun <*oni*>, "esti frakcia"!

Posedaj pronomoj havas la finaĵon "a", kaj en akuzativo "n".

Tiel kiam Regulo 2 diris ke la posesivoj estis formataj per <*de*> ...

La deklinacio de la pronomoj estas identa al ti de la substantivoj.

Ha, ĉu la radiko kun la adiciita <o> estas la nominativo, konsekvence por la pluralo, la literon <j> oni devas aldoni?

Ekzemple: mi|n, mi|a, la vi|aj.

Notu tiun "la viaj". Kiel la ordinaloj, la esperantaj posesivoj povas okazi en la rolo de verbaj argumentoj (kiel en la angla: "la mia estis la unua"), tial iliaj adjektivaj finaĵoj ne havas sencon. Reale, ili estas estas determiniloj - vidu Ci vidu la sekcion K2.

6. La verboj ne estas ŝanĝataj laŭ personoj nek nombroj. La nun-tempo finiĝas per "as", la pasinta tempo per "is", la venonta tempo per "os", la kondicionalo per "us", la imperativo per "u", kaj la infinitivo per "i". Estas ankaŭ participoj aktivaj (kun "ant", "int", "ont") kaj pasivaj (kun "at", "it", "ot"). La prepozicio ĉe la pasivo estas "de", ekzemple mi far|as, la patr|o far|as, ili far|as.

Jen duonbona elekto de vortekzempl, ĉar <fari> neniam estas helpanta verbo.

Verbaj formoj:

- + La tempo prezenca finiĝas per as; ekzemple mi far|as.
- + La tempo preterita finiĝas per is: vi far|is, li far|is.
- + La tempo futura finiĝas per os: ili far|os.

La tempomarkado estas fetiĉita; la aspektomarkado estas marĝenita.

- + La modalo kondicionala finiĝas per us: ŝi far|us.
- + La modalo imperativa finiĝas per u: far|u, ni far|u.
- + La modalo infinitiva finiĝas per i: far|i.

Se tiuj estas ĉia "modaloj", kial estas la kondicionalo vestata kiel tempo? Ĉu ne povas verbo esti samtempe preterito kaj kondicionalo?

Estas du formoj de participo en la internacia lingvo, la deklinaciebla aŭ adjektiva, kaj la nedeklinaciebla aŭ adverba.

Unu el la plej strangaj deliroj kiujn la esperantistoj daŭre subtenas estas la nocio laŭ kiu Esperanto estas "la" internacia lingvo. Reale ĝi eĉ ne estis la unua

konstruita helpolingvo kiu akiris internacian sekvadon (ci vidu la Sekcion X, paragrafo a)... sed mi ankoraŭ ricevas elektronikajn poŝton neante la eksiston de ĉiu ajn alia internacia lingvo. Ekde fremdaj nacioj. En la angla lingvo.

+ La participo aktiva prezenca finiĝas per ant: far|ant|a, far|ant|e.

Se ĝi signifus ion kiel "Li kiu..." ĝi estus substantiva frazo.

+ La participo aktiva preterita finiĝas per int: far|int|a, far|int|e.

+ La participo aktiva futura finiĝas per ont: far|ont|a, far|ont|e.

Anstataŭ havi apartan elementon por indiki la tempon, kion oni povus emfazi kiam la tempo gravus aŭ preterlasi kiam la tempo ne gravus, la tempo estas inkluzivita trifoje, unue kiel verbofinaĵo, denove kiel parto de la aktivaj participoj, kaj ankoraŭfoje por la pasivoj. Escepte se ni intencis pensi ke <-is>, <-int-> kaj <-it-> kunhavas la morfemon <-i->... ĉe kies okazo, kial ĝi aperas ankaŭ por marki la infinitivojn?

+ La participo pasiva prezenca finiĝas per at: far|at|a, far|at|e.

+ La participo pasiva preterita finiĝas per it: far|it|a, far|it|e.

+ La participo pasiva futura finiĝas per ot: far|ot|a, far|ot|e.

Se la konstruado de prezenta participo aldonas iel elementon de progresiva aspekto, kiel mi formas ne progresivan pasivon? Aliflanke <ili faras> kaj <ili estas farantaj> signifas ekzakte la saman aĵon, kial mi bezonas do lerni du malsamajn vojojn por diri ĝin?

Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj prezenca aŭ preterita participo pasiva de la bezonata verbo, la prepozicio ĉe la pasivo estas de.

Ĉu ne estis tiu la markilo por la posesiva (genitiva) kazo?

Ekzemplo: ŝi est|as am|at|a de ĉiu|j.

Ĉu ci rememoras kiel "li" definitive "faris" kaj "la patro faras" dum "ŝi" nur "povas fari"? Ĉu ci rememoras kiel la aktivaj participoj signifas formojn kiel "li kiu faras"? Dum nun la pronomo "ŝi" okazas kiel la unika uzata kiel la kanona ekzemplo of pasiveco...

7. Adverboj estas formataj per aldono de "e" al la radiko.

Krom ke ni jam trovis unu adverban modifanton kiu finas per <i>:

Gradoj de komparado estas la samaj kiel ĉe adjektivoj. Ekzemple: mi|a frat|o
pli bon|e kant|as ol mi.

Parolante denove pri la reĝo de Romo, li per la pordo ekaperas. Ankoraŭfoje la maskulaj parencoj akaparas la atenton.

8. Prepozicioj per si mem uzas la nominativon.

Herezo!

C) ĜENERALAJ REGULOJ

Jen ĉiuj PARTOJ DE LA PAROLADO finitaj - se Esperanto havas konjunkciojn ajn, ili estas sekreto.

9. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita. Ne estas neelparolataj literoj.

Ĉi tie ni iras denove kun la reguloj de skribosistemo.

10. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

La ununura peco de informado pri la fonologio de Esperanto kiu rangas por esti klasita kiel oficiale nombrita regulo.

11. Kunmetitaj vortoj estas formataj per simpla kunigo de la radikoj de la vortoj. La ĉefa vorto staras je la fino.

Jen ne nur alia regulo malŝparita por preskribi kiel la lingvon oni devus skribi, jen regulo kiun plimalpli neniu estas iam vidinta kiel obeatan regulon! Eĉ pli, ĉiu tradukaĵo enhavas proprajn kaj konfliktaĵojn; la franca eldono, ekzemple, diras ke la streketoj estas ŝablonaj (sed liberelekteblaj en la korespondado kun fluaj parolantoj), dum la pola eldono montras ilin kiel tipografiaj klinitaj stangetoj (/) kaj ne donas eksplikadon. Al ĉiu legantoj kiuj esperas ke la eldono en Esperanto povus esti ŝablona, aŭ almenaŭ "elementa", ve:

ĝi nek uzas nek mencias la streketojn en la nukleo de ĉi tiu regulo!

Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (radikoj) (la ĉefa vorto staras en la fino); ili estas kune skribitaj kiel unu vorto, sed, en elementaj verkoj, disigitaj per streketoj (|). La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. Ekzemple: vapor|ŝip|o estas formita de: vapor, ŝip kaj o (finiĝo de la substantivo).

Tiel en <vaporŝipoj> la gramatika finaĵo <j> por la pluralomarkado estas la precipa vorto.

12. Se en frazo estas alia nea vorto, forlasu la "ne".

Demandi "Ĉu ĉi tio ne portas nin nenien" estas malpermesita! Flankete, unu el la plej stultaj nerespondoj kiujn mi ricevas al mia kritiko de la devigaj sistemoj por inflekcio de la tempo, por la nombro kaj por la kazo, estas ke tiu pleonasmo povas esti utila. Ja, ĝi povas esti utila. Sed la resto de la tempo ĝi estas senutila. Jen kial mi sugestas ke ĝi estu liberelektebla, kaj ke oni permesu al la uzantoj decidi kiom de ĝi ili bezonas. Dume, jen Zamenhofo eksplicite malpermesinte popolan formon de pleonasma markado, anstataŭ diri al ni ion pri kiel la neado funkcias!

13. En frazoj respondantaj al la demando "kien", la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

Iu devus esti dirinta al Zamenhofo ke "kien?" estis malbona gramatiko. Ĉi tiu konstruado ne estas limigita al la respondo de demandoj, tamen - ja, ĝi povas esti iu demanda frazo:

Ekzemplo: kie|n vi ir|as?;

Ci rigardu, estas sufikso <-n> en ĉi tiu demando, gluita al la tabelvorto <kie>... reprezentanto de tuta familio de vortoj kiuj ne estas ensistemitaj de ĉi tiuj reguloj!

mi ir|as Pariz|o|n, London|o|n, Varsovi|o|n, dom|o|n.

Respondi ĉi tiun demandon per simpla loknomo estus danĝere ambigua, ja - malkiel "de kie ci venis?", kie ĝi estas perfekte sekura...

14. Ĉiu prepozicio havas en Esperanto difinitan kaj konstantan signifon, kiu

fiksas ĝian uzon

Reale, kelkaj signifoj estaj benitaj kun pluraj aĵoj de la prepozicio - <de>, ekzemple, kiu krom esti posesiva aŭ foje agentiva markilo, ankaŭ atingas havi la aldonajn difinitajn fiksaĵojn "disde" kaj "ekde tiam".

Sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kiun prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu ne havas memstaran signifon;

Ci atendu, kion? do, aĥ, ĉu ĉi tiu <je>... estas prepozicio en la internacia lingvo? Kaj kiel ekzakte mi detektus tian bezonon?

Ekzemple: ĝoj|i je tio;

Ĉi tiu "tio" estas nelistita pronomo. (Ve, ĉu ĝi ne estas "persona" pronomo, kiel <ghi>? Evidente, tio pravas.)

rid|i je tio, enu|o je la patr|uj|o.

Bone farite managante por retrometi la radikon <patr> denove tien.

En ĉiuj lingvoj oni uzas en tiaj okazoj iun ajn prepozicion, se nur la uzado donis al ĝi sankcion,

Ne, multaj el la plej gravaj lingvoj de la mondo eĉ ne havas prepoziciojn.

En la internacia lingvo ĉiam estas uzata en similaj okazoj nur la prepozicio je. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio, se oni timas nenian dusencaĵon.

Strange, la versio en Esperanto de ĉi tiu teksto (el la angla) permesas la sufikson <-n> nur kiel akuzativa aŭ dative markilo kaj diras nenion pri ke ĝi anstataŭ imagan prepozicion kiu signifas nenion konkrete!

15. La tiel nomataj vortoj "fremdaj", t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finiĝojn de tiu ĉi lingvo. Tia estas la regulo koncerne la bazajn vortojn, sed ĉe diversaj vortoj de unu radikilo estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton bazan kaj formi la ceterajn derivaĵojn el tiu ĉi

lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia. Ekzemple: tragedi|o, sed tragedi|a; teatr|o, sed teatr|a (ne: teatrical|a), kaj tiel plu.

"Sen ŝanĝo" estas okulfrapa mensogo; ekzemple, "quasar" fariĝas <kvazaro>, taŭge ne por la sono nek eĉ por la ortografio de la originalo. Venitaj tien, malankaŭ estas vero ke tiuj estas "tiel nomataj vortoj fremdaj" – al la recentaj akiraĵoj ni nomas "fremdajn", ne al la akiraĵoj de la mezepoka angla lingvo, kiel "teatro". Sed Esperanto havas neniun pli malnovan, "denaskan" vortaron!

16. La "o" de la substantivoj kaj la "a" de "la" povas esti iafoje forlasataj kaj anstataŭataj de apostrofo pro belsoneco.

That's "for la sake of eufony" - as I'm sure we all agree, Esperanto is improved by any reduktion in la amount of it that's spoken.

Ekzemple: Ŝiller' (Schiller) anstataŭ Ŝiller|o;

Mi estus pensinta ke la plej grava konsideraĵo estis la jena: Friedrich von Schiller prononcis sian nomon kun unu [l] kaj sen [e] (Fridriĥ fon Ŝilr).

En tiaj okazoj apostrofon devus anstataŭi la forigita vokalo.

Nu, tiel kiel la ne prononcitaj kaj ne skribitaj streketoj, Esperanto havas ĉi tiujn preskaŭ ne distingeblajn apostrofojn ankaŭ! Sed kien iras la akcento en <Shiller'>? Kaj kiel estas ĉi tiuj silentaj signoj ne malpermesitaj de la Regulo 9?

Nun, kion oni perdas disde ĉi tiuj dek ses ordonoj? Nu, preskaŭ ĉio pri la fonologio, deriva morfologio aŭ sintakso... ĝi devus porti ĉirkaŭ tiom da frazo denove simple por atingi la klason de baza superrigardo kiun mi dezirus legi en la fronto de turista frazlibro.

SEKCIO Z: LETERKESTO

justin.byam.rye@gmail.com (justin punkto byam punkto rye atelo gmail punkto com)

1997: Nun, kiam mi akiras trafikon de fidindaj centroj por konstruita lingva sperteco kiel tiu de Mark Rosenfelder (<http://zompist.com/>) mi agnoskus pli volonte ke mi ne povas pretendi la senerarecon - mi eĉ ne atingis trovi ĝisdatitan version en angla de "Ci lernu Esperanton al ci mem"! Tial ci poŝtu min – mi

repoŝtos agnoskon por korektaĵoj; aŭ ci sendu mallongajn specifajn refutadojn (ci adiciu adekvatan markadon laŭ tipo HTML, sen interpoli fiklerpedantajn eldonajn regurdojn); aŭ ci indiku ligilojn al alia retsituo por etenditaj malargumentoj.

1998: dume (07 - Februaro - 1998) mia edinburga kunulo Geof Eddy (prononco: Ĝof Edi) havas siajn proprajn ŝuldojn kiujn enspezi de Esperanto [nun atingeblaj nur via la retrovoja interreto de la tuj aperonta ligilo].

(<http://web.archive.org/web/20030811165117/www.cix.co.uk/~morven/lang/es.html>).

Wael Al-Mahdi (gulfgc atelo batelco punkto com punkto bh, waelalmahdi atelo yahoo punkto com, <http://waelalmahdi.com/>), 09 - Februaro - 1998:

Dekomence, mi ŝatus fari tion klara, ke mi ne estas entuziasma Esperantisto. Mi ĉiam provas esti objektiva.

Cia kritiko ja estas konvinkema en iuj punktoj, sed eble ci estis ankaŭ iom ekstrema kaj subjektiva en cia atako al Esperanto kaj Zamenhofo. Mi opinias, ke cia sekcio pri fonologio estas speciale konvinkema. Sed mi ankoraŭ opinias, ke ci estis tro... nu, tro severa. Ŝajne ci komplete ignoris ĉiujn bonajn punktojn en Esperanto. Mi mem opinias, ke ĝi estas bela lingvo, fleksebla kaj simpla. Sed mi vidas nenion bonon en la ideo de Zamenhofo, laŭ kiu Esperanto estu internacia lingvo.

Dankon [al li en lia lasta viva epoko antaŭ ol forpasi, prononce Don Harloŭ] Don Harlow (01 - Marto - 1998) pro indiki ke la denaskaj parolantoj de la pola lingvo naskitaj en Polujo ne estas nepre loĝantoj de Polujo.

De Francesco Amerio (f punkto amerio atelo agora punkto stm punkto it), 30-Apr-98:

Mia kara,

mi ghojas konstati, ke vi havas ideojn malsamajn ol miaj: la mondo estas bela char ghi buntas!

Sed, mi petas, ne devigu min uzi vian lingvon: mi studis ghin nur dum kvin jarojn kaj mi apenau kapablas per ghi mendi kafon!!
Bonan laboron!

1999: la lasta modo estas el ĝeneralaj akuzoj pro fakta neakurateco, bakitaj jen tute sen ekzemploj jen per pugnoplenujo de senespere kontestablaj punktoj. La stranga parto estas ke ĉi tiuj akuzoj ordinare aperas kiel aferoj kiujn mi nur prezentis en mia paĝo pro la insistado de aliaj zamenhofistoj, kiuj diktis ilin kiel urĝe bezonitaj korektadoj!

2000: mia kapablo por partopreni en retleteraj maratonoj da 1.5 megabajtoj limiĝis lastatempe; sed mi ankoraŭ legas mian leterkeston, kaj mi estas dankenda al ĉiuj komplezaj pedantoj, helpemaj esperantistoj kaj aliaj, kiuj faris ŝlosilajn kontribuaĵojn malantaŭ la scenoj.

2001: por ŝpari embarason, mi devas averti al la popolo kiu esperas kaŝi siajn partizanejojn, ke la historioj da postado en diskutogrupoj estas facile ekzameneblaj ...

2002: post sinsekvo de nekutime mutaj kontribuaĵoj mi komencas bedaŭri mian politikon de neniam citi popolon sen ties konsento, sed tiu politiko ankoraŭ daŭras: se ci volas ke mi publicu ciajn komentojn, tion ci diru eksplicite!

Davor Klobucar (davor punkto klobucar atelo ht punkto hr), 29 - Aŭgusto - 2002:

Eĉ se estas aĵoj en Esperanto, kiuj povus esti plibonigitaj, tio ne estas motivo por rifuzi Esperanton. Eĉ nun Esperanto estas bona sufiĉe. Tiu "bona sufiĉe" signifas ke la lingvo jam estas tre facile lernebla, kaj ke ĝia strukturo jam estas tre bona kaj regula. Kaj ĝia sonaro estas kiel bona kiel la sonaro de ajna alia lingvo.

Ni unue ĝin studu, ĝin parolu, ĝin skribu. Ni unue ĝin vivigu inter multaj milionoj da parolantoj. Jen tio kion la esperanta parolantaro jam estas farinta antaŭ pli ol unu jarcento, kaj granda kvanto da tio estas farita bone. Poste, kiam ĝia estonteco estos stabila, ni rajtos discuti ŝanĝojn, sed sisteme, tre zorge kaj per bone organizita vojo. Eĉ Zamenhofo diris ke tio eblis. Sed ĝis tiu epoko, Esperanto disvolviĝas.

Mi faris multe en / por / pri Esperanto. Sed se unu alia lingvo aperus, tiom facile lernebla kiom Esperanto kaj apartenante al neniu aparta nacio, kaj se tiu lingvo havus sufiĉajn forton, monon kaj parolantojn, do mi ĝojus forgesante mian

karan Esperanton, kaj aliĝante al tiu nova lingvo. Sed la ŝanco preskaŭ estas nulo, ĉar ajna nova lingvo verŝajne havos multajn solvendajn problemojn ekde ĝia "infanaĝo" al la tempo de ĝia "matureco", kiujn Esperanto jam solvis.

Tio kio estas esenca, estas la principo, ne la aparta lingvo. Kaj eĉ pli grava, estas havi eĉ hodiaŭ iun vivan lingvon kiel Esperanto, almenaŭ por montri al la mondo la eblon de tiaj lingvoj kaj la valoron de la ideo mem.

2003: Ci ĝoju libera por speguli ĉi tiun pamfleton aliloken ajn, sed se ci intencas preni eksmodan eldonon (kompleta kun arkaikeskaj "ĵus modifitaj" markiloj), kripli ĝin per Microsoft Front Page (prononce: Majkrosoft Front Pejĝ) kaj poste montri ĝin kvazaŭ se mi estus ĝirante cian ĝisfunde dubindan skemon de internacia helpolingvo, do mi ŝatus ke ci almenaŭ evitus proklami ke ci posedas la kopirajton. (Sen interreta ligilo, ĉar ili ne meritas la sukcon de interreta serĉilo).

Muta Fanatika Bigoto (ja tiel; nydube atelo yahoo punkto com, indoyug atelo hotmail punkto com, esperado atelo wp punkto pl...), 03 - Oktobro - 2003:

Saluton, ci malĝentila, malaminda, malrespekta, ne civilizita, rasista troglodito! [...] Kiom muta estas mi? [...] Mi kunordigas projekton pri civila socio kaj leĝdona reformo en Centra kaj Orienta Eŭropo. Kiel parto de mia laboro, mi vojaĝas ekstere kelkfoje ĉiun jaron por ĉeesti kongresojn, fari prezentojn, kaj kunveni estrojn de la ne registara sektoro, kiel ankaŭ parlamentanojn, plejsuperajn justicajn tribunalojn, kaj jurajn kompetentulojn. [...] En mia 8-paĝa respondo (kiun oni resendis al mi kiel ne liverebla), mi notigis [...] ke granda parto de cia kritiko implikas starigi kiel estas la aferoj en jen ĉi tiu jen tiu lingvo kaj poste precizante ke Esperanto tion faras malsame – kiel se tio pruvis kiom malbona estas Esperanto! [...] Jes, Esperanto havas sian kvoton da strangaĵoj, malregulaĵoj kaj nekoheraĵoj, sed ili estas malgrandaj kompare kun la meritoj de la lingvo. [...] Ĉio dirote, mi estas vojaĝinta al 35 landoj in 3 kontinentoj. Kie estas CI loĝita, ci malsprita barbara??? [...] Ne laciĝu kontraŭdirante – cia elektronika poŝto estos forviŝita sen esti lektita.

Vi propraj juĝu lian inteligenton laŭ la fakto de ke li permesas al mi citi lin tiel. Tutaĵe, li sendis ok ĉi tiajn detalemajn miksaĵojn de regurdita propagando kaj neatentinda egomanio, la plimulto el kiuj estis identaj, krom variaĵoj en la fontadreso kaj en la formato de mesaĝo (almenaŭ mi atingis ke li ĉesus gluante ilin

kiel dokumentojn per formato de Majkrosofto Ŭordo, "Microsoft Word"). Ŝajne li imagas ke ĉi tio estas convinkante min pri ke la esperantistoj ne estas "Mutaj Fanatikaj Bigotoj" ... Nu, mi scias ke iuj el ili ne estas tiel.

2004: Ĵus mi estas akvokovrita kun "novaj globaj helpolingvaj proponoj", ellaboritaj pure per reformitaj ortografioj por la angla lingvo...

2005: post ok jaroj da falsaj "korektadoj" de partizanoj kiuj nur legis la unuan Sekcion, kiel kutime estas iu ne esperantisto kiu indikis la tajperaron en la unua frazo! "Bialystok" (prononce: Biaŭistok) havas jen literon C jen mezestrekitan literon L, ne ambaŭ literojn... do dankon al ci, david punkto marjanovic atelo gmks punkto at. Dankon ankaŭ al Christofer Culver (prononce: Kristofer Kulver), kiu avertas pri ne konfidi ĉe la proklamadoj de ke la uzo de Esperanto helpus por protekti la naciajn lingvojn. Fakte ĉi tiu estis aparte bona jaro por sanaj kaj edukitaj korespondantoj... do prefere mi senkulpigus min antaŭzorge pro ĉi tiu Specala Halloween (tradicia horora festo anglosaksa, prononce "Haloŭin"). "Ĉiu simileco kun aktualaj lingvoj, vivaj aŭ dismortitaj, estas pure koincida."

2007: nur por montri ke la senatenteco ne estas limigita al la esperantista agadkampo...

Clay Shentrup (prononco: Klej Ŝentrup), 14 - Majo - 2007, skribate sub la temlinio "Esperanto suĉas":

Mi estas lerninta la hispanan dum la lastaj du tagoj, kaj [...] mi startos kunigante ion pli bona, nomata provo "parolim". Mi deziras ke ĝi estu projekto bazita ĉe trovi ĉiam la plej freŝajn belsonajn (sed ankaŭ taŭgajn) radikojn, kaj antaŭenirante ekde ĉi tie.

Mian sugeston pri ke estus helpema la posedo de kelkaj bazaj konoj pri nocioj kiel, ekzemple, sintakso, li ricevis kun nekredemo:

Se mi pensas ĉirkaŭ kiel mi priskribus koncepton kiel "Mario simple venis en la ĉambron kaj senvestis sin fronte al mi... impresema!", mi povas simple aranĝi la manieron per kiu la objektoj, la priskribantoj kaj la agadoj laborus kune en mia lingvo por esprimi tian koncepton. Mi scias kiel tion mi dirus per la angla lingvo, kiu estas mankonforta startopunkto - iu vojo por rigardi kiel tia aĵo estas jam

farita, tiel mi ne bezonas starti el la nulo. Mi eĉ ne bezonas povoscii lingvon por fari mian propran lingvon - tio nur faciligas la taskon.

Kaj tiam li insistis, ke mi citu lin pri ĉi tio.

2008: Esperantista korespondanto provizis interretŝaltilon por Demandoj Ofte Faritaj ([www.esperanto.qc.ca / html / faq-mensonges-fr.htm](http://www.esperanto.qc.ca/html/faq-mensonges-fr.htm)) - dankon!